



4^a trimestro 2009

En Tours, edziĝo de 2 infanoj

En tiu numero vi legos..



La 24^{an} de Junio 1436, tago de Sankta Johano, en la ĉirkaŭaĵo de la kastelo de Tours regas nekutima agitado. La homoj amasiĝas sur la najbaraj stratoj por spekti la brilan akompanantaron, kiu iras sub la suno de tiu somero.

Meze de la soldatoj, kavaliroj, ĉiaj veturiloj kaj ĉaroj, estas malfacile ekvidi tiun, por kiu tia eskorto paradas : principeto de 11 jaroj, Margareta, filino de la reĝo de Skotlando, Jakobo la Unua.

La bona popolo de Tours estas kortuŝita de la destino de tiu infano. Margareta ĵus forlasis por ĉiam siajn familion, amikojn kaj patrujon por edziniĝi kun Luizo, la unuenaskita filo de la reĝo de Francando, Karlo la Sepa. Luizo estos 13 jara, la 3^{an} de la venonta Julio.

La edziĝo, aranĝita pro politikaj kialoj, efektivas la aliancon de Skotlando kaj Francando, la unuiĝon de la kardo kaj de la lilio. Grava alianco, dum tiu Centjara Milito, por elpuŝi la anglojn el la lando.

Elirinta de Edimbourg, la juna princino, akompanata de mil skoltoj, elŝipiĝis en la Rochelle en Majo. Post halto en Poitiers,

kie oni varme akceptis ŝin, ŝi nun estas en Tours, celo de la vojaĝo.

Kion pensas la filineto, kiu malkovras tiun novan landon kaj ties loĝantojn, kies lingvon ŝi ne parolas kaj kies suvereno ŝi eble estos iam ?

En la kastelo de Tours, Margareta estas akceptata de la reĝino Maria de Anĵuo, la patrino de sia fianĉo. Maria tenere brakumas kaj kondukas ŝin al sia filo, kiu atendas en najbara ĉambro. La du infanoj spontane kisas sin. La reĝino sendas ilin ludi ĝis la horo de la vespermanĝo.

La morgaŭan tagon, en la kastele kapelo, en la ĉeesto de multaj francaj kaj skoltaj senjoroj, okazas la edziĝa ceremonio, simpleca ceremonio prezidata de monsinjoro Regnault de Chartres.

Margareta surhavas longan veluran mantelon el ora drapo. En ŝia arte kombita hararo, brilas diskreta diademo. Luizo estas vestita de vestaĵo el grize blua veluro ornamaĵita de oraj brodaĵoj. Li fiere montras spadon, donaco de sia bopatro, la reĝo de Skotlando. La spadingo, blanka, estas dekoraĵita de figuroj de la Virgulino kaj de Sankta Mikaelo.

La reĝino Maria de Anĵuo, en robo el blua veluro, tenere rigar-

Ĉu infanoj 11-jara kaj 13-jara povas edziĝi ?
D. Baron rakontas... p.1
p.2

Nia ĉeka amikino Marie Zýková forpasis la 6an de novembro 2009. p.2

Papilio, silkraŭpo, ĝis ŝtofo en silko : M.-Cl. Ledoux vizitis bombiksobredejon. p.3

Post du lernadojaroj Ch.Hénault faris eksterordinaran vojaĝon, kies raporto indas eksterordinaran enpaĝigon. p.3
ĝis p.7

J-M Simonet tradukis utilajn konsilojn por laboruloj... (eble ne nur ?). p.8



Turanĝia
luko n°16

das tiujn du infanojn. Sed la reĝo Karlo la Sempa, alveninta lasta minute el Amboise, ne havis tempon ŝanĝi la vestaĵojn : li surhavas sian grizan kostumon por vojaĝo kaj ankoraŭ havas siajn botojn kaj spronojn. Li ŝajne estas indiferenta pri la okazaĵo.

Bankedo kaj dancoj finas tiun strangan edziĝan ceremonion. Ek de la morgaŭo, la novaj geedzoj estos disigitaj. Ili devos atendi

plurajn jarojn antaŭ ol kune vivi.

Sed neniuj infano naskiĝis el tiu kuniĝo. Kun malsolida farto, Margareta mortis je la aĝo de 20 jaroj pro pulma inflamo. Ŝia morto malmulte kortuŝis sian edzon. Tiu, kiu iĝis la reĝo Luizo la XI^a ne multe sentis tenerecon por tiu edzino trudita de sia patro.

Dominique Baron

Forlasis nin Marie Zýková, 81-jara

Ŝi estis ĉeka amikino de Caroline Mauboussin. Ŝi sendis plurajn tekstojn, kiuj aperis en nia Turanĝia Luko : - Pilzena biero, en n° 2 ; - La unua ĉeka libro, en n° 3 ; - Legendo pri Macocha, en n° 4 kaj 5 ; - Meditĝardeno, en n° 13 ; - La anĝeleto por feliĉo, en n°14.

Jen kelkaj linioj el la gazeto de E-Handikapuloj, kiun ricevas Gérard Layseman : "Post la dua mondmilito, en la jaro 1945, la juna knabino Marie ekaŭdis en la naskiĝloko Bystré u Polický unuan mencion pri la lingvo, per kiu oni povas interkompreniĝi kun la tuta mondo. Al ŝi tiu ideo tiel ekplaĉis, ke ŝi forlasis la germanan kaj rusan lingvojn kaj la tutan vivon ŝi dediĉis nur al Esperanto... En la jaro 1947 ŝi frekventis E-kurson... Tuj ŝi komencis korespondi kun geamikoj en la mondo kaj Esperanton jam neniam forlasis !

Maruŝka estis ne nur mia kara, bonega amikino, sed ĉefe amata, bonkora kaj hom-ama virino. Preskaŭ ĝis la lastaj tagoj ŝi aktive praktikis Esperanton kaj disdonadis ĝojon, vivoptimismon, ĉiam preta senprofite helpi.

Kun granda malĝojo mi ricevis la 6-an de Novembro 2009 informon pri ŝia foriro. Mi dankas al ŝiaj familianoj por la senhalta amo, zorgemo kaj flegado. Same mi kore dankas al ĉiuj geamikoj, kiuj vizitadis ŝin en la pilzena hospitalo.

Věra Muchnová, Strakonice"

Papilio, silkraŭpo, ĝis ŝtofo en silko

Unue necesas havi morusujojn.

La papilio demetas ovojn (bombikso de morusujo). La ovojn oni bredas en loko aperta : la bombiksobredejo.



Estas kvin stadioj dum la vivo de la silkraŭpo antaŭ ol ĝi fariĝos kokono. Antaŭ la metamorfozo en papiliono, la kokono estas mergata

en varman akvon por havi silkon en ununura filamento. Estas 1500 metroj en ĉiu kokono, do necesas pluraj filamentoj por fari fadenon. Post pluraj transformoj oni obtenas silkan fadenon. Tiam oni povas kolorigi ĝin. Ĝi estas preta por teksado.



Vizito tre interesa : Magnanerie du Coudray Macquard 49260.

En kokono la tuto estas bona !!!!! : en Ĉinio la krizalido estas rekuperata por aperitivo kaj la ekskremento ekspektaj al Usono por la klorofilo, ĉar la silkraŭpo manĝis foliojn de morusujojn ĝian tutan vivon. Bonan gustumadon !!!

Marie-Claude Ledoux

VOJAĜO en UKRAINIO

Mi partoprenis en la internacia arta E. Festivalo « VELURA SEZONO - 14 » en Jalta en Krimeo, kiu okazis de la 27^a de Septembro ĝis la 5^a de Oktobro.

La festivalo okazas en periodo, kiu en Jalta nomiĝas velura sezono, kiam suno ne plu bruligas, sed kiam maro estas ankoraŭ varma.

Jalta estas fama ripozurbo en duoninsulo Krimeo ĉe Nigra maro (Ukrainio), oni nomas ĝin « Perlo de la suda bordo de Krimeo ». Norde ĝin ŝirmas montoj, sude ĝin karesas la maro. Tio kreas mediteranean klimaton. Belega naturo, montoj, maro, historiaj vidindaĵoj allogas amason de turistoj.

Tial Jalta estas centro de perklimata kuracado pro ĝia saniga mediteranea klimato. Mezjara temperaturo en Jalta estas 13 gradoj, nur 36 frostaj tagoj jare, somero kutime estas seka kaj varmega.

Vintro, tamen, estas kaprica, sed neĝo vintre estas raraĵo. Dum lastaj 100 jaroj frostoj dum Novjaro okazis nur 25 foje. La plej varmega monato - Aŭgusto, la plej malvarma - Februaro. Temperaturo de mara akvo vintre malaltiĝas ĝis plus 7-8 gradoj, tamen, tio povas okazi eĉ Aŭguste pro okcidenta vento, forblovanta varman akvon. Pasintjare tutan Aŭguston temperaturo de mara akvo estis ne malpli ol 26 gradoj.

Ĝi estis unu el la luliloj de la internacia Esperantomovado. En centro de la urbo estas du memortabuloj omaĝe al famaj Esperanto-pioniroj.

Tiu kongreso estis mia unua provo kiel esperantisto post 2 lernadojaroj. Plie mi neniam vojaĝis sola al eksterlando per aviadilo.

Mi foriris la 21^{an} de Septembro al Varsovio en Pollando por renkontiĝi kun geesperantistoj de Jalta, kiuj partoprenis en la kongreso « ARKONES » en Poznań de la 18^a ĝis la 20^a de septembro.

Do, jen mia vojaĝo tagon post tago.

London la 21^{an} de Septembro 2009

Antaŭvidita foriro je la 10^a kaj 23 minutoj el Saint Pierre-des-Corps per TGV.

Bedaŭrinde la TGV por la flughaveno ROISSY jam malfruis pli ol 2 horoj. Rapide mi ŝanĝigis mian bileton por alia trajno ĝis Montparnasse, alie mi certe maltrafus mian aviadilon.

Sed pro tio, mi devis veturi ĝis la flughaveno per la AIR FRANCE buso.

Tamen mi antaŭtempe alvenis. Mia aviadilo ekflugis je la 16^a kaj duono kiel antaŭvidita kaj surteriĝis en Varsovio je la 18^a50. La vojaĝo estis 1650 (mil sescent kvindek) kilometrojn longa.

Svetlana atendis min, kaj je la 19^a30, ni busis kaj iomete paŝis ĝis la kampardometo de Irek BOBRZAK, kie ni alvenis je la 21^a30.

Tiam, komenciĝis mia unua interkonatiĝa vespero.

Mi konatiĝis kun :

–Irek BOBRZAK, profesoro en la Universitato de Varsovio kaj fama aktivulo en la radio "VARSOVIA VENTO".

–Jefim ZAJDMAN la prezidanto de la esperanta klubo en Jalta kaj kun lia edzino Anĝela.

–Svetlana KRAVKOVA, kiu estas reĝisorino de la teatro de Jalta.

–Daniel SAVCHENKO, kiu estas membro de la klubo de Jalta, kaj kiu lernas esperanton nur de 6 monatoj.

–juna belga geo.

Post longa parolado, ni kuŝis kvinope en la sama ĉambreto.

Mardon la 22^{an} de Septembro 2009

Mi vekigis je la 8^a. Ni iomete matenmanĝis (teon kaj kukon) kaj rapide tualetis ĉar estis nur unu krano ekstere kun malvarma akvo. Necesejo, kiu situas 200 metrojn for, konsistis el kabano kun slabo kaj truo sen papero do, nepre necesis ne forgesi paperon, alie

Parolado ĝis la 11^a, kaj ni foriris piede ĝis la bushaltejo por busi ĝis la stacidomo de Varsovio, kie ni tagmanĝis ĝis la 14^a.

Poste, ni malkovris la malnovan urbon de Varsovio ĝis la 17^a kun ZBIQNIEV KOVALSKI, kiu gvidis nin.

Rapida malmultekosta pola vespermanĝo (10 mn).

Poste, ni renkontiĝis kun geesperantistoj de Varsovio ĝis la 21^a30 en ilia klubo.

La geesperantistoj en Jalta prezentis sian klubon, kaj ludis malgrandan teatraĵon en esperanto (Longa lango far TCHEKOV).

Fine, okazis amikeca koktelo por konatiĝi.

Finfine IREK petis, ke kelkaj personoj legu anoncojn, kiujn li registris por la radio « Varsovia Vento ». Mi mem legis por la 49^a elsendo, la anon-

con pri La Novjara Renkontiĝo de Brazilo E-Junularo, kiun vi povas aŭskulti ĉe <http://www.podkasto.net>.

Reveno en la dometo je la 22^a, kaj parolado ĝis la noktomezo manĝante sandviĉon.

Merkredon la 23^{an} de Septembro 2009

Ellitiĝo je la 5^a. Rapida tualeteto, matenmanĝo, kaj foriro piede ĝis la bushaltejo, kie ni enbusiĝis je la 6^a. Je la 6^a45, ni alvenis en la stacidomo de Varsovio, kie ni enrajniĝis je la 7^a15 por iri ĝis CHEMSY. Tie ni devis enbusiĝi ĝis la limlando en plenega buso. Transpasado de la limlando inter la 15^a kaj la 16^a, tie la doganistoj liveras vizon al mi.

Ni estas en Ukrainio.

Ukrainio estas unu el la plej gravaj landoj en la orienta eŭropo. Ĝi estas iomete pli vasta ol Francio. De longe, oni nomas ĝin : « la grenejo de la rusa imperio » pro la riĉeco de ĝia grundo.

Denove ni busis dum 2 horoj ĝis LVOV. La buso estis malnova kaj ankaŭ plenega. La vojoj estas en malbona stato.

Alvenante en la stacidomo de LVOV, ni metis niajn valizojn en la pakaĵdeponejon kaj poste ni aĉetis niajn trajnbiletojn por la morgaŭo. Ni iris en la malmultekostan kaj senkonfortan hotelon. Necesejo kaj duŝejo por ĉiuj en la koridoro. Varmeta akvoflueto por duŝi sin.

Ĵaŭdon la 24^{an} de Septembro 2009

Ellitiĝo je la 6^a sen matenmanĝo.

Post la duŝo, ni iris al la bazaro por aĉeti manĝaĵon por manĝi en la trajno.

En la centra urbo, la vojoj kaj trotuaroj estas en tre malbona stato. Ankaŭ la tramoj estas malnovaj. Oni spiras polvon kaj polucion. Oni havas impreson, ke ni estas kelkajn jardekojn malantaŭe.

Fine ni trinkas kafon kaj rekuperas valizojn.

Preskaŭ ĉie, por iri al necesejo, oni devas pagi kaj preni necesejan paperon ĉe la kasistino. Ĉie estas turka necesejo.

La kuŝtrajno ekiras je la 9^a ĝis SIMFEROPOL. La vojaĝo daŭris 24 horojn por trairi 931 km. La trajno estas tre malnova, sed ŝajnas, ke ĝi estas la plej bona. En ĉiu vagono estas kontrolistino.

Rigardante tra la fenestro, mi vidis manfalĉiston kaj garbojn. Por okupi nin, ni manĝas kaj

babilas.

Daniel estas kapitano en la rezervularo, kaj nun estas emerito malgraŭ sia aĝo (51) pro la akcidento de TCHERNOBYL.

La etoso estas tre bona.

En la vagono estas tapiŝoj. La fermilo estas tre malnova : dum momento, ni estis blokita interne. Certe la reloj ne kuŝas samnivele, ĉar la trajno moviĝas senĉese, multe bruas. Inter 2 vagonoj, trapaso estas preskaŭ danĝera.

Vendredon la 25^{an} de Septembro 2009

Ellitiĝo je la 8^a. Ĉiuj rapidas al necesejo.

Oni sin demandas, kiel sin lavi per flueto da malvarma akvo. Estas tre malfacile por fluigi ĝin : oni devas premi piŝton sub la krano por fluigi akvon sur la alia mano.

La matenmanĝo konsistas el la postrestaĵoj (viando, tomatoj, kukumo, fromaĝo, verda teo kaj pano).

Ni eniras en Krimeo ĉirkaŭ la 7^a. La suno brilas, la vetero estas bela kaj varma.

Krimeo estas duoninsulo, kiu situas en la suda Ukrainio. Pro ĝiaj klifoj, montoj, rokoj, kaj nigra maro, ĝi estas unu el plej belaj regionoj de la lando. Nigra Maro estas la limo inter Ukrainio kaj Turkio. Ĝi similas Mediteraneon ĉar ĝiaj akvoj estas same varmaj.

Ni alvenas en SIMFEROPOL je la 10^a. Tuj ni aĉetas busbiletojn por Jalta. La foriro estas antaŭvidita je la 11^a. La vojaĝo estas 80 km longa.

Ĉiam kaj ie ajn, la taksiaĵistoj senĉese petas por veturigi nin.

La kamionoj estas malnovaj kaj veturas rapide. Ofte la stiristoj telefonas veturante kaj preterpasas sur la blanka linio.

Fine ni alvenas je la 13^a en Massandra super Jalta.

Mia dormoĉambro situas en studentlernejo, kaj kostas po 11€ nokte. Necesejo kaj duŝejo estas puraj kaj modernaj.

Bedaŭrinde mi ne plu povas telefoni.

Je la 14^a, vizitado en Jalta (promenado sur la kajo, kie estas nombraj stratmovadoj kaj multaj homoj). Tio estas belega.

Poste ni aĉetas revenbiletojn por la 6^a de Oktobro al Kievo.

Mi revenas en dormoĉambro je la 21^a30.

Sabaton la 26^{an} de Septembro 2009

Je la 9^a, ni foriras al SEBASTOPOL.

Antaŭ SEBASTOPOL, ni haltas en BALAKLAVA je la 10^a45. Tie, oni trovas malnovan fortikaĵon, kaj grandan submaran muzeon konstruitan sub la monto. Dum la krimea milito, tiu urbo estis uzita kiel militŝipa bazo por la angla armeo.

BALAKLAVA estas ankaŭ fama pro ĝia mar-navigada muzeo, kiu estis konstruita en galerioj, kiuj kondukas al malnova nuklea ŝirmejo : atesto de la malvarma milito kontraŭ la okcidento.

Ni faras promenadon sur la maro.

Poste ni busas ĝis SEBASTOPOL, kie ni alvenas je la 13^a.

SEBASTOPOL estas tre konata de la uzantoj de la pariza metroo, ĉar tiu nomo elvokas la plej krue-lan batalon de la Krimeo, kiu kontraŭfrontis inter 1854 kaj 1855, la rusan imperion al la britanaj kaj francaj armeoj.

De la 19^a jarcento, SEBASTOPOL estis la ĉefa haveno de la rusa ŝiparo. Cetere, tiu urbo estas ankoraŭ milita bazo, kaj ĝis 1996, neniu fremdulo ne povis eniri tien malgraŭ la beleco de ĝia golfeto plurajn kilometrojn longa.

Tuj ni tagmanĝas en «sovietstila» restoracio. Kompreneble ni manĝas la faman supon « borĉ ».

Poste ni promenas en HERSONES (fama historia loko) sur la bordo de la nigra maro. Je la 19^a, ni busas por reiri al Jalta.

Dimanĉon la 27^{an} de septembro 2009

Libera mateno

Je la 13^a30, ni ekbusas ĝis LIVADIA PALACO, rezidentejo kiu estis konstruita dum la reĝado de NICOLAS II.

Fama loko ĉar ĉi tie, ROOSEVELT, STALINE kaj CHURCHILL subskribis la famajn akordojn, kiuj ŝanĝis la homan historion post la dua mondmilito.

Tre bela palaco. Ĝi situas fronte al la maro kaj la promenada vojeto estas 6711 m longa.

Ni revenas je la 16^a por renkontiĝi kun aliaj geesperantistoj, kaj je la 19^a ni partoprenas en kunveno por sin prezenti kaj paroladi ĝis la 22^a.

Lundon la 28^{an} de septembro 2009

De la 10^a ĝis la 12^a, vizitado de Jalta far Jefim, la prezidanto de la esperanta klubo. Ni estas ĉirkaŭ

dek .

Jalta estas unue unu el ĉefaj banlokoj en Krimeo, kie caroj libertempis. La urbo estis konstruita en la elfluejo de 2 riveroj. Inter la 2, belega promenadvojo borderita de palmoj, la kajo LENINE laŭiras malgrandan plezurhavenon transe de kiu troviĝas la plaĝoj de Jalta.

Je la 13^a, mia gvidistino, kiu estas reĝisorino en teatro proponas al mi ĉeesti la provludojn en la kultura universitata centro.

En Jalta, ni povas uzi multajn publikajn transportrimedojn : buson, malgrandan buson kaj tramon.

Ni vespermanĝas en la loĝantaro (geamikoj de mia gvidistino). Tre bona etoso.

La edzo estas kuiristo, kaj plie hodiaŭ estas la naskiĝtago de ilia filino (20 jaraĝa) pro tio, la vespermanĝo estas abunda kaj diversspeca. Bedaŭrinde, li dezirus drinkigi min multe da vodko kaj vino. Firme mi devas haltigi lin.

Mardon la 29^{an} de septembro 2009

Matenmanĝo ĉiam abundas.

Estas la ŝtato kiu pagas por la gestudentoj, kiuj interŝanĝe faras malgrandajn tenlaborojn, kiel purigado.

Poste, foriro per buso kun alia geo ĝis ALOUPKA, kie troviĝas la tre belega VORONCOVA PALACO kaj parko. La vetero estas bela sed malvarma estas la maro. Tamen ni iras sur la Voroncova plaĝo kaj ili sin banas.

Ni trinkas krimean teon.

Ni revenas buse ĉirkaŭ la 18^a.

Esperanta kunveno de la 20^a ĝis la 22^a.

Merkredon la 30^{an} de septembro 2009

Libera mateno. De la 13^a ĝis la 16^a, vizitado de la kultura centro.

Je la 19^a, esperanta koncerto ĝis la 21^a30 .

Ĵaŭdon la 1^{an} de oktobro 2009

Matenmanĝo je la 9^a, kaj je la 10^a ni foriras buse ĝis la ruĝaj rokoj ĉe NIKITA por demonstro de rokgrimpado. Poste, laŭvice, ĉiu rokgrimpas ĝis la 13^a30.

Post la rokgrimpado, ni vizitas la botanikan ĝardenon de NIKITA. Tre bela parko.

La reveno okazas je la 18^a. Ni spektas koncerton je la 19^a.

Vendredon la 2^{an} de oktobro 2009

Ni busas ĝis Jalta, alibusas ĝis la parko PARADIZ URBETO (kuraĉloko AŬVAZOVSKOE, la fama pentristo, kiu pentris la maron). Alveno en tiu parko je la 11^a. Tiu parko estas tre belega, interne estas sando por riĉaj homoj. Rezidlokoj estas konstruataj tie, kaj la tutaĵo kun aliro al la maro. Eĉ ni vidas kurejon por helikoptero.

Je la 12^a30, ni tagmanĝas en plaĝrestoracio. La vetero estas mirinda.

Reveno je la 17^a kaj ripozo, poste, ni spektas koncerton en la kultura centro ĝis la 21^a30. Tie, ĉiu partoprenanto kantas kaj ludas gitaron.

Sabaton la 3^{an} de oktobro 2009

Kiel ĉiam, matinmanĝo je la 9^a.

Je la 10^a, renkontiĝo por impresoj de la partoprenantoj de E. Kongreso.

Serĝo rakontas sian travivitan sperton dum antaŭa kongreso, kaj poste, PAVEO (rusa viro) ludas gitaron kaj kantas.

Je la 12^a, ni tagmanĝas en la sama ĉambro (bananojn, akvomelonon kaj vinberojn) kaj trinkas to-matsukon.

Je la 13^a30, ni busas ĝis la zoo apud Jalta.

Ne multe da sekureco : ni paŝas super leonoj sur rusta ponteto. La manrelo altas nur 1 metron.

Je la 16^a, fino de la vizitado.

Ni tagmanĝas en malgranda restoracio, kiu situas apud la elirejo.

Je la 16^a30, vizitado de la muzeo TCHEKOV, de la parko kaj de la datcha.

Ni revenas je la 19^a.

Dimanĉon la 4^{an} de oktobro 2009

Kiel ĉiam, abunda matinmanĝo je la 9^a.

Je la 10^a, kunveno, kie Sacha kaj Ben rakontas sian sperton. Poste, kantoj ĝis la 12^a.

Tuj ni foriras piede de la bazejo tra la arbaro ĝis la palaco de MASSANDRA kaj ĝia parko.

La gastuboj kuras tra la arbaro je la alteco de 1 metro.

Je la 17^a, ni foriras por promenado sur la kajo.

Je la 18^a30, reveno al la bazejo por lasta kunveno

kaj adiaŭoj.

Lundon la 5^{an} de oktobro 2009

Ne plu estas da varma akvo en la duŝejo, sed ne paniku ĉar ĉi tie tio estas tute normala.

Pro miaj kalkanaj spinoj, kiuj tre doloras, mi apenaŭ povas paŝi. Do mi ripozas en la dormoĉambro ĝis la foriro.

Je la 15^a, mi busas ĝis la stacidomo, kie kelkaj esperantistoj venis por saluti min.

Aliaj esperantistoj akompanas min ĝis Kievo.

Ni ekbusas je la 17^a10 al SIMFEROPOL (tre bela stacidomo). Alveno je la 19^a15.

Tie ni renkontiĝas kun ukraina geo.

La edzo estas ĵurnalisto, li parolas france kaj diras al mi, ke ĉiutrigare li venas al Francio por fari subakvajn filmojn kun la skipo COUSTEAU.

Alia esperantisto nomata Jakub venis speciale por saluti nin. Ni babilas dum iom da tempo, kaj li akompanas nin ĝis la trajno. Niaj interkisedoj estas varmaj.

Je la 20^a17 foriro de la trajno.

Mardon la 6an de oktobro 2009

Ni ne multe dormis ĉar senĉese estas iroj kaj reiroj, klakitaj pordoj, la trajno sin multe skuas kaj la malvarmo ekaperas.

Vekiĝo (se oni povas diri tiel) je la 7^a, kaj mi rapidas por iri al necesejo cele al iomete lavi la vizaĝon per malvarma akvo.

Alveno je la 11^a30 (900 km dum 14 horoj 30).

Ni retrovas Raja kaj ni tagmanĝas fronte al stacidomo.

Poste je la 13^a, ni ekskursas buse tra la urbo.

Ĉirkaŭ la 15^a30, Serĝo retrovas nin kaj ni promenas kune piede.

Je la 16^a30, denove ni tagmanĝas, kaj ni promenas ĝis la 18^a30. Poste, ni metroas kaj busas ĝis la ĉirkaŭaĵoj de Kievo, kie Ivan atendas nin.

Ni gastas ĉe Ivan kaj lia edzino ĝis la morgaŭo.

En tiu momento, mi min ĝenas, ĉar oni tre facile rimarkas la malriĉecon. Malgraŭ tio, ili akceptas nin kun plezuro. La apartamento estas malgranda, sed tamen, ili loĝas 2 gestudentojn por gajni monon.

La vespermanĝo konsistas el salato kaj terpom. Nenio por trinki manĝante, feliĉe mi havas akvobotelon. Post la manĝo, ili ofertas kafon aŭ teon.

Mi noktokuŝas sur matraco surtere.

Merkredon la 7^{an} de oktobro 2009

Vekiĝo je la 7^a30. Rapide mi tualetas ĉar ne estas varma akvo.

Ni matenmanĝas kun « nescafe » kaj « pain perdu ».

Ni eliras je la 8^a45 por veturi per taksio dum 34 km ĝis BORISPOL, kie situas la flughaveno de Kievo.

Ivan alvokas taksion, kaj petas de mi, ke mi ne parolu por interkonsenti kun la ŝoforo pri la prezo.

La interkonsentita prezo estas 100 grivnaj (10 eŭro). Alie la prezo estus pli multekosta.

Enaviadiliĝo kaj ekflugo je la 12^a55.

Alveno en Parizo je la 16^a30, kaj poste, je la 18^a24, mi trajnas per TGV ĝis Saint-Pierre-des-Corps, kie mi alvenas je la 20^a11.

Finfine, je la 21^a00 mi estas hejme.

Charly Hénault



Komunikado, proceduroj, hierarkio.

1°) Komunikado

Viro eniras en la duŝejon en preciza momento kiam lia edzino eliras el ĝi : tiam la sonorilo sonoras ĉe la pordo de la domo. La virino envolvas sin en tualettukon, malsuprenkuras la ŝtuparon kaj iras malfermi la enirpordon. Estas Laurent, la sametaĝa najbaro.

Antaŭ ol ŝi povas elparoli vorton, li diras al ŝi :

- Mi tuj donos al vi 800 Eŭrojn se vi lasas fali la tukon, kiu kovras vin.

Ŝi rapidege pripensas kaj decidas lasi la tukon fali. Li admiras ŝin laŭplaĉe, kaj prezentas al ŝi 800 Eŭrojn. Iomete miregigita, sed kontentiga pro la kapitaleto, kiun ŝi ĵus gajnis tiel rapide, ŝi resupreniras en la banĉambron.

Ŝia edzo ankoraŭ sub la duŝo demandas ŝin :

- Kiu estis ?

- Estis Laurent.

- Bonege. Ĉu li redonis al vi la 800 Eŭrojn kiujn li ŝuldis al mi ?

Moralaĵo n°1 : Se vi skipe laboras, rapide dividu la informojn rilatajn al komunaj dosieroj, vi tiel evitos multajn malagrablajn miskomprenojn.

2°) Proceduroj

Stirante sian veturilon, pastro rekondukas religiulinon al la monaĥinejo. La pastro ne povas reteni sin rigardi ŝiajn belegajn krucitajn gambojn. Li subite metas sian dekstran manon sur la femuron de la religiulino. Ŝi rigardas lin kaj diras al li :

- Pastro, ĉu vi memoras pri la psalmo 129 ?

Konfuza, la pastro formetas sian manon kaj prezentas siajn ekskuzojn.

Iom pli malproksime, cedante al la tento, li profitas rapidumŝanĝon por lasi sian manon flugtuŝi la femuron de la religiulino, kiu demandas lin :

- Pastro, ĉu vi memoras pri la psalmo 129 ?

Li ruĝiĝas plian fojon kaj formetas sian manon, balbutante ekskuzon.

Ili nun alvenas al la monaĥinejo. La religiulino elaŭtiĝas sen elparoli vorton.

Afliktate de remorsoj pro sia malkonvena ago, la pastro kuregas al la Biblio kaj serĉas la psalmon 129.

Psalmo 129 : « Iru antaŭen, serĉu pli kaj pli alten, vi trovos gloron »

Moralaĵo n°2 : Sur la laborejo, bona scio pri la proceduroj estas konsilata por atingi la celojn.

3°) Hierarkio

Reprezentanto, oficistino kaj dungitarestro eliras tagmeze el la oficejo kaj paŝas al malgranda restoracio kiam ili trovas sur benko malnovan olelampon. Ili frotas ĝin kaj genio eskapas el ĝi.

- Mi kutime konsentas 3 dezirojn, sed ĉar vi estas tri, vi ricevos nur po unu.

Gestadante, la oficistino dispuŝas la du aliojn :

- Miavice, miavice ! Mi volas senfine ferii sur la senmakula strando de suna insulo, sen iu zorgo, kiu povus malhelpi min ĝui mian vivon. Kaj pum ! la oficistino malaperas.

La reprezentanto antaŭenpaŝas siavice.

- Miavice, miavice ! Mi volas trinkgustumi sensoifigan trinkaĵon sur strando de Tahitio kun revrava virino.

Kaj pum ! la reprezentanto malaperas.

- Estas via vico, diras la genio, rigardante la dungitarestron.

- Mi deziras ke tiuj du uloj revenu en la oficejon post la tagmanĝa paŭzo ...

Moralaĵo n°3

Ĝenerale, lasu ĉiufoje la ĉefojn esprimi sin unue kaj malfidu la dungitarestron.

Jean-Mary Simonet

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr